

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Eldonantaro:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Olli Norja, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonia)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrerejo:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

Redaktoro:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Kunredaktoroj: J. Fethke, H. Hurler, Max Buttin.
Literatura red.: Zanoni.

Kunlaborantoj inter la Esperantistaro de la turo.

Semajna

Abonon ni akceptas ne por fiksita tempo (jaro, monatoj) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpigo de la sumo. Pri finiĝonta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko je germana banko.

Kun senpaga monata „Revuo“

La prezo de unu numero estas por la landoj:

| | | | | |
|-----------------|-------------------|--------------------------------------|-------------------|--------------------|
| Aŭstra 800 Kr. | Ĉeĥosl. 1.20 Kr. | Germana 40 Mk. | Jugosl. 1.60 Din. | Portug. 0.50 Esk. |
| Belga 0.60 Fk. | Finna 1.20 Fmk. | (Germanoj abonu Kanada 0.06 Dol. | Rumana 3 Lei. | Sveda 0.24 Kr. |
| Brita 3/4 P. | Francia 0.50 Fk. | ĉe sia poŝtoŭcelo) Nederl. 0.16 Hfl. | Svisa 0.30 Fk. | U. S. A. 0.06 Dol. |
| Bulgara 3 Levaj | Hispana 0.50 Pes. | Itala 0.70 Lit. | Norvega 0.30 Kr. | |
| Dana 0.50 Kr. | Hungara 30 Kr. | Japana 0.10 Jen. | Pola 120 Mk. | |

Balkianoj kaj rusoj demandu la prezon ĉe sia Aboneito. Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fr. Fk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Neŭtrala

Listo de Abonejoj en diversaj landoj sur paĝo 4. Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.

Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm² 0.10 svlsan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 30 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Specialaj prezoj por eksteraj aŭ specialaj numeroj.

En letero direktita al ni ne pritraktu aferojn, kiuj koncernas Butin & Jung. Scienca Revuo k. a. l. Alie ni ne povas plenumi ilin!

Numero 110 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 12. Novembro 1922.

Propagandu interne!

„Pro kio vi ne venas plu al niaj kunvenoj? Vi volas esti Esperantisto, sed ŝajnas, ke vi ne konas la devon, kiu al ĉiu Esperantisto ordonas: viziti konstante la kunvenon de via grupo! Kiamaniere ni povas sukcesi, se neniu samideano volas veni al niaj kunvenoj? Venas ĉiam la samaj entuziasmaj kaj fervoraj samideanoj, kaj eĉ iom post iom malaperas multaj el ili. Ili preferas resti hejme aŭ viziti iun kinematografejon aŭ teatron aŭ amuziĝi en alia maniero. Ili neniam vizitas nian kunvenon... ĉu ili rajtas nomi sin Esperantistoj kaj porti la verdan stelon? Ho, ili estas ja parazitaj de nia movado. Ili ne estas samideanoj. Por ili Esperanto estas nur flanko afero!...“

Permesu al mi, sinjoroj, ke mi respondos al vi je ĉi tiu riproĉo pli detale. Iam mi estis ankaŭ tia fervorulo kaj entuziasmo kaj kuris diligente kaj konscience al ĉiu grupkunveno. Hodiaŭ — mi bedaŭras, ke mi perdis tion da tempo, kiun mi estus povinta eluzi pli profite por mi kaj por nia movado. Ĉar kion mi profitis ĉe vi? Por konfesi la veron, mi perdis la tempon! Mi venadis al vi en vian kunvenon, plena je konfido kaj pacienco. Mi sidigis kaj atendis. Fine oni malfermis la kunvenon. Verdire tio ne estis malfermo. Oni komencis diskuti pri diversaj aferoj. Oni pripensis, kiamaniere oni aranĝos la venontan propagandan vesperon, kaj oni embarasiĝis pro tio, ke oni ne havis bonan paroladanton. Oni „decidis“ nepran plialtigon de la kotizoj, ĉar la kaso havis tro multajn elspezojn. Oni interbabilis pri nova ejo por la kunveno de la grupo. Oni nepre devis ŝanĝi la statutojn. Oni ŝanceliĝis, ĉu presigi la statutojn. La prezidanto komunikis, ke li deziras ekzisti pro manko de tempo. Oni petegis, ke li restu. Oni volis alian, oni proponis neĉeestantajn personojn. Oni fine perfortis maljunan sinjoron akcepti ĉi tiun oficon. Oni plu vagadis en sferoj „organizaj“ kaj propagandaj.“

Kaj la ĉeestantoj, kiuj vere ne estis multnombraj, amuzis sin laŭ sia maniero. Ĉeestis fraŭlinoj, kiuj komprenis nenian vorton Esperantian kaj do tute ne aŭskultis, kion la estraro decidis. Ili babilis multon, kaj ilia atento koncentriĝis je aferoj, kiuj interesas kutime junulinan koron. Ankaŭ diversaj junuloj ĉeestis, kiuj havis similajn interesojn. Aliaj interŝanĝadis poŝtmarkojn kaj vigle diskutis pri temoj poŝtmarkaj, ĉu „dentita“ aŭ „fuŝpresita“ ktp. Mi aŭdis nur ĉiam la samajn homojn paroli kaj diskuti pri la samaj temoj... ĝis fine pro tro malfrua horo

oni „prokrastis“ ĝis venonta kunveno la aferon pri nove aranĝota perfektiga kurso.

Kelkajn fojojn mi venis. Mi spertis diversajn erarkmpreojn inter la estraro, kiuj rezultigis novajn elektojn. Mi [konstatis, ke ekestis pli


Esperantistoj! Kion vi prezentas al ni, komencantoj, kiuj venas konfide en vian kunvenon, por profiti por nia Esperanto-scio koncerne la lingvon kaj la tutan movadon? Kion vi povas doni al ni, kiuj ni pacience eltenis la tre malglatan

CO, pri Lingva Komitato, Akademio, pri 14 okazintaj Universalaj Kongresoj, pri plej kuriozaj nekonataĵoj... kiujn ni, kvazaŭ hundetoj, nazfaretas kaj vane penas ĝisfunde esplori. Ni vane serĉas tiurilatajn klarigojn. Kaj oni postulas, ke ni defendu Esperanton, ke ni kontraŭbatalu mokemajn atakantojn, ke ni „donu al ili sur la nazon“, se ili moketas nin. Sed ni ja ne povas rebati iliajn dirojn kaj asertojn per tio, kion ni lernis kaj spertis sur nia „tra-lernolibro“ vojaĝo. Ni volas aŭdi ion novan en la grupkunveno, kiel ni povas defendi nin plej bone kaj trafe.

Esperantistoj! Ĉu vi opinias, ke la ĉefa afero estas: aranĝi kaj aranĝadi kursojn, propagandajn paroladojn ktp.? Ho, vi eraras! Pli grava, multe pli grava kaj urĝa estas la interna vivo de la grupo. Bedaŭrinde ankoraŭ nia afero ne tiom progresis, ke la homoj devas lerni Esperanton kaj devas ĝin uzi. Esperanto estas ankoraŭ tute libervola afero. Ĝi estas lernata precipe de homoj, kiuj scipovas rigardi antaŭen! Progresemuloj ni estas. Aŭ ni opinias nin tiaj. Sed en veroco ni estas homoj ordinaraĵ kiel ĉiu aliaj, kiuj ne lernis Esperanton. Ŝajnas al mi, ke venis jam la tempo por pliatenti pli multe la internan propagandon. Ni mem devas fariĝi Esperantistoj kaj ne resti nur simplaj Esperantanoj. Unue ni devas konstrui la fundamenton por ĉiu plua agado: la grupon.

Kie restas la Esperantistoj? Kредu al mi, ke ekzistas en ĉiu urbo pli multaj Esperantistoj, ol la mizere vizitata grupkunveno supozigas. Ili sidas kvazaŭ talpoj en slaj kaŝitaj loĝejoj — vi devas ilin ellogi. Tion vi nur povas, se vi aranĝos la grupkunvenojn interesaj kaj profitodonaĵ.

Aranĝi grupkunvenon sen programo estas sen-sencaĵo. La estraro devas havi specialan kunsidon kaj prepari la programon. Ĉi tiu programo povas konsisti ne nur el aferoj, kiuj koncernas la propagandon kaj organizon, sed ankaŭ el instruaĵ kaj amuzaj partoj. Oni devas atingi, ke iom post iom ĉiu samideano havos paroladon aŭ prelegon en Esperanta lingvo, kiujn sekvu senĝena diskutado kaj debato pri la koncerna temo. Oni aranĝu eventuale „Vivantajnurnalon“ kun diversaj kunlaboraĵoj, deklamoj, humoraj, anoncoj ktp. Oni interkonatiĝu pli intime kaj kreu iom post iom „malgrandan rondon familian“, en kiu estos interese kaj agrable estadi... Sed nepre laboru laŭprograme. Via grupo bone impresos ĉiun eksterlandan samideanon, se la prezidanto levigis, malfermas la kunvenon kaj laŭleĝos la programon.



Vizito de s-o Nicasto Retamales, urbkonsilanto de Santiago de Ĉilio kaj portanto de saluletero de „Ĉilia Junularo Esperantista“ al la brazila Esperantistaro okaze de la 1-a Centjaro de l' Sendependeco de Brazilio.

De maldekstre: s-o J. Michulevich (ruso), s-o J. Josikawa (japano), Ing. H. Moita Mendes, ĝen. sek. de B. L. E., Ing. A. Couto Fernandes, prez. de B. L. E., s-o Nicasto Retamales, urbkonsilanto de Santiago de Ĉilio, s-o Felisodoro Gata, urbkonsilanto de Rio de Janeiro, D-ro Venancio da Silva, vicprez. de B. L. E., f-lino Frany Baggi de Arango, 2. sek. de B. L. E., s-o Hawker (anglo) kaj s-o Odillo Pinto, 1. sek. de B. L. E.

diversaj malkonsentoj, kaŭzitej de bagatelaj, eĉ akraj disputoj, post kiuj diversaj „pacemaj“ samideanoj forlasis la kunsidon. Mi konstatis kiel objektiva rigardanto, ke formiĝis — por tiel diri — „estrecumado“. Ke diversaj homoj „rivalis“ pro la estreco, ke ekestis disputo inter la malnovaj kaj novaj samideanoj, el kiuj ĉiu sciis pli bone aranĝi la koncernan aferon... kaj la interna ideo „triumfis“!

kaj skuoplenan vojaĝon tra la gramatiko kaj vortaro, kiujn vi — kiel ni nun konscias — mal-faciligis al ni per dika lernolibro kaj multaj necesaj paroloj? Fine, fine „ni atingis la celon en gloro“. Kaj nun... nun? Vi volas, ke ni kundiskutu, kiel aranĝi novan kurson, kiamaniere antaŭenpuŝi nian movadon... se ni eĉ ne scias precize, kio okazas kaj okazis en Esperantujo. Ni ofte aŭdas ion pri UEA, pri

Pinkus Rozenberg.

De A. Averĉenko.

En la malgranda manufaktur-vendejo, aparanta al Pinkus Rozenberg, staris oficisto:

„Montru al mi malhelbluan veluron. Ĉu vi havas tion?“

Pinkus ekridis vidigante ofenditan mienon: „Vere, ni bele aspektis, se ni ne havus en la vendejo malhelbluan veluron! Bele sonas la firmao „Pinkus Rozenberg“, se en ĝi ne troviĝus ĉiuspeca veluro — tio estus ja ne nur ridinda, sed eĉ plorinda.“

„Do bonvolu montri al mi.“

„Kion montri?“

„Nu, veluron! Pecon da veluro!“

„Ah, jes, veluron... Mi tuj montras al vi pecon da ŝtofo, ke vi ĝojkrios pro kontenteco. Jen vi havas! Bonvolu bone ĝin rigardi!“

La vendisto per lerta movo malvolvis pecon da blua ŝtofo kaj komencis ĝin glatigi per la mano:

„Estas plezuro ĝin rigardi! La riĉa sinjorino Gindik prenis de ĉi tiu peco tridek ulnojn!...“

„Pardonu!... Vi certe malbone aŭdis! Mi petis malhelbluan veluron, kaj vi montras al mi malhelbluan silkon!“

„Belega silko!“

„Nu, bone, sed mi bezonas veluron!“

„Ah, veluron! Kial vi ne tuj diris tion? Malhelbluan?“

„Malhelbluan.“

„Vi povas demandi ĉiun knabon en la strato, per kio akiris gloron la firmao „Pinkus Rozenberg“ — kaj la knabo tuj diros al vi: per malhelblua veluro!“

La vendisto eliris el alta breto grandan pecon da ŝtofo:

„Kiel plaĉas al vi jen tiu ĉi „genia“ veluro?“

„Bone, sed ĝi ja estas nigra.“

La vendisto ekrigardis la oficiston kun miro:

„Kaj vi... klan veluron vi ja deziris?“

„Pro la diablo! Mi ja petis de vi malhelbluan.“

„He, sekvu mian konsilon, prenu ĉi tiun! Ĝi estas preskaŭ kiel malhelblua. Mi ne diras al vi preskaŭ, sed vere, kiel malhelblua.“

„Ne, mi ne bezonas nigran.“

La vendisto glatigis la ŝtofon per fera mezurilo kaj diris multi-signife:

„Hodiaŭ estas la plej moda koloro de veluro — nigra! Ĉiu homo portas nur nigraĵojn.“

„Tre eble, sed mi petas doni al mi malhelbluan.“

„Veluron?“

„Nu, tute certe — veluron!“

„Prenu pecon da bona sateno, ĝi estis tiel malhelblua, ke oni efektive ekmiras.“

„Aŭskultu!“ ekkriis la oficisto jam iom ekscitite pro senpacieneco. „Mi diras al vi tute klare: se vi havas malhelbluan veluron, donu al mi, se ne, mi vin adiaŭos, kaj iros en alian vendejon.“

„Li“ iros en alian vendejon! Karaj homoj, kion vi diras pri tio? „Li“ iros certe al Ichok Mendeleviĉ, kiu ĵus en pasinta semajno venenis sian patrinon, aŭ eble al Jakov Zusman, kie oni alŝovos al vi tian pecon da ŝtofo, ke vi dankos Dion, se vi de ĝi liberigigos. Bone! Atendu minuton, mi nun montras al vi tian pecon da ŝtofo, ke vi ekkrios: Rozenberg! Detranĉu por mi cent ulnojn!“

La vendisto sentis sin iom senkuraĝigita, li balancis la kapon ofendite, kliniĝis al malsupra breto kaj elprenis el tie helbrunan ŝtofon:

„Kion vi diras ekzemple pri tiu ĉi katuno?“

„Pro ĉiuj diabloj, iru for kun via katuno! La afero urĝas, kaj vi tedas min per tio, kion mi ne bezonas...“

„Vi ne bezonas katunon? Nu, bone, mi nun donos al vi ĝuste tion, kion vi deziras. — Do, vi deziras veluron. Bone! Jen vi diris al mi, kion vi volas.“

„La sinjoro oficisto volas veluron.“ Mi estus vere rabisto, se mi forrebus de vi tempon.

Ĉar la tempo estas tia aĵo, ke, se pasas apenaŭ minuto, verdire eĉ ne pli ol mallonga minuteto, jam ĝi perdiĝis, jam ne revenas plu, kaj eĉ Dio mem ne povus ĝin revenigi ĉu al mi, la vendisto Pinkus Rozenberg, aŭ eĉ al „la sinjoro oficisto.“

La vendisto subapogis la kapon per la mano kaj malgaje enprofundiĝis en pensojn, li profunde ekspiregis kaj melankolie diris:

„Kaj jen tiaj minutoj fariĝas horoj, tutaj horoj...“

„Ĉu vi montras al mi fine malhelbluan veluron? — se ne, diru, ke vi ne havas!“ ekkriis la oficisto jam kolere — „Mi petas vin: donu al mi veluron, ĉu vi komprenas? Malhelbluan! Nek nigran, nek verdan, nek flavan... Nek katunon, nek batiston, — nur veluron! Ĉu vi komprenas?“

— V-e-l-u-r-o-n-i!“

Pinkus Rozenberg penis forpeli de si la profundajn pensojn kaj diris afable:

„Bone, vi tuj ricevos vian deziritan veluron. Kiom da ulnoj vi bezonas?“

„Kvar kaj duonan.“

„Kial ne sep?“

„Tial, ĉar mi bezonas nur kvar kaj duonan.“

„Jes, bone. — Ĉu vi havas oficon ĉe ni en la urbo?“

„Jes, ĉi tie en la urbo. Nu, bonvolu iom pli rapide!“

„Mi montras al vi veluron tiel rapide, kiel neniu kuriero kapablas fari.“

Rozenberg denove prenis pecon da ŝtofo kaj ĝin lace malvolvis.

„Jen estas veluro! Cetere, ĝi estas verdire malheluga.“

„Vi vidas, mi ne devigas vin ĉi tiun

aĉeti — tamen, ĝi ja ankaŭ estas veluro. Mi tre bone scias, ke, se vi bezonas nepre malhelbluan, mi...“

„Pro la diablo!“ jam senpacienctigis la oficisto. „Ĉu vi montras al mi malhelbluan veluron? Respondu al mi: jes aŭ ne?“

„Ĉu nepre malhelbluan?“

„Jes, malhelbluan!“

„Ĉu nepre nur malhelbluan, tio estas, vere ne alikoloran?“

„Ne, ne alikoloran, nur malhelbluan!“

„Mi tre bedaŭras, malhelbluan veluron en la nuna momento mi ne havas. Tio estas, mi havas veluron, sed nur ne malhelbluan. Mi havas ankaŭ malhelbluan, sed nur ne veluron! Eble vi bezonas ankoraŭ ion alian, ni havas grandan kolekton de sateno, puntoj... nu?“

„Nu, vi ja tuj povis diri, ke vi ne havas veluron.“

„Kion signifas: mi ne havas? Mi ja havas, nur la malhelblua veluro ĵus elĉerpiĝis. Bonvolu veni post unu, du semajnoj, tiam mi certe havos ĝin... Eble vi bezonas kaptukojn, koltukojn, naztukojn...“

La oficisto deturnis sin redite, kun kolero fermis brue la pordon kaj eliris el la vendejo.

Pinkus Rozenberg levis la ŝultrojn, eliris antaŭ la vendejon kaj, poŝtrigardante la oficiston, kiu per rapidaj paŝoj malproksimiĝadis de la vendejo, li ekbalancis la kapon kaj diris:

„Ĉarlato! La tutan vendejon li traserĉis kaj nenion aĉetis!“

Kaj vi speros: ili revenos ĉiuj, ili aliĝos denove al vi — ili, kiujn vi ĉiam akre riproĉis pro ilia neĉeesto. Ili revenos kaj laboros aktive. Komuna laboro kreas interkonsenton. Sed ni devas dividi nian laborforton. Vi ne povas postuli, ke junuloj propagandu publike. Ilin anstataŭ pli aĝaj sinjoroj, kiuj seriozigas nian aferon antaŭ la publiko. Ĉiu laboru laŭ sia maniero. Malnovaj Esperantistoj, informitaj bone pri la antaŭmilita movado, ne estu avaraj je siaj spertoj kaj opinioj. Talentaj verkantoj kaj oratoroj interesiĝu la programon. Fraŭlinoj kantu aŭ deklamu aŭ montru al ni sian lertecon en la muziko.

Ĉiu estu sur sia posteno! Ne nur en la interna vivo de nia grupo, sed en nia tuta Esperanta movado! Ĉiu sin specialigu por tiu fako, por kiu li plej multe taŭgas. Ne ĉiu estas oratoro, propagandisto aŭ lerta organizanto. Ne ĉiu povas samtempe esti gvidanto de kursoj kaj lerta skribanto de artikoloj aŭ verkanto-tradukanto. Dividu la fortojn!

Esperantistoj! Via plej arda deziro estas la plena venko de Esperanto. Nun ni devas pli ol iam streĉi la fortojn, ĉar ankoraŭ venos malfacilaj tempoj por nia movado. Ni ne estu revemuloj, sed realaj idealistoj! Ni faru al ni nenajn iluziojn, sed rigardu, kio efektive okazas. Ni serĉu niajn erarojn, ni serĉu rimedojn por pli rapide labori.

La vivo en la grupo estas pli grava ol oni kutime imagas. Veki la intereson por Esperanto ne estas malfacile, sed daŭre konservi ĝin, jen vera arto! Kion profitas nia afero, se ni sukcesas bruligi pajlofajretojn, kiuj... ne estingiĝas, sed kontraŭe plej ofte ekflamas, por poste ĉirkaŭi nin Esperantistojn per malgrabila fumo plena je moko kaj rido... Niajn plej grandajn kontraŭulojn ni serĉu inter ni mem! Ni mem ilin ja kreas, se ni ne sukcesas ilin konservi por nia movado! Kaj kio povus ilin konservi, se ne la grupa vivo?

Samideanoj, rigardu kaj kontrolu vian grupon, ĉu ĝi funkcias, aŭ ĉu ankaŭ ĝi vegetas laŭ supre priskribita maniero? Mi scias, ke multaj koleros al mi kaj aliaj ridetos kompare pri miaj „grizaj“ teorioj, kiujn mi ĉi tie starigas. Sed kedu al mi, ke ankaŭ en ĉi tiu okazo ekzistas esceptoj — grupoj, kiuj vivas! Do — la afero povas funkcii.

Vi cerbumas multe pri tio, kiel pli rapide antaŭenigi Esperanton. Vi intencas enkonduki Esperanton en la lernejojn? Ĉu efektive vi opinias, ke vi estas jam preparitaj por tiu grandioza verko? Ĉu vi ne trompas vin mem, tion pensante? Enradikigi Esperanton, ne kontentigi pri surpaperaj sukcesoj! Krei Esperantistojn, ne postmarkemajn aŭ flirtemajn geulojn! Zorgi kaj atentigi, ke al la samideanoj ne ŝajnu ŝarĝo, viziti kunvenojn, sed vera plezuro! Klopodi, ke la grupo vivu kaj ne vegetu mizere!

Unue konstruu la grupon. Propagandu interne! Kaj nur poste kuraĝu ekagi publike! Vere kedu al mi, se vi agos alie, vi ne akcelos nian aferon!

Sincerulo.

Por forigi tiun krimon: La Milito.

La okazintaĵoj, kiuj sin sekvas ĉiutage, kaj ĉefe tiuj ankoraŭ tute proksimaj, kiuj preskaŭ ĵus interrompis la pacon en Oriento, vidigas certe, kion urĝas trovi rimedon „por forigi tiun krimon: la milito“.

Kaj kio estas necesa por sukcesi forigi por ĉiam la militon „tiu produktanto de funebro kaj ruinoj, tiu abomeninda spiveto al la simpla saĝo, al la divina kiel al la humana justeco, al la talika kiel al la kristana moralo“ kiel ankoraŭ antaŭ kelkaj tagoj ĝin prave nomis la iniciatinto de nia bela Asocio, nia amiko Henriko Demont?

Estas necese, ke en la tuta mondo la homaro estu organizita kiel estas la popoloj en ĉiuj civilizitaj nacioj, tio estas ke estu:

Unue internacia juro, kiu estu la disciplino de la tuta homaro, kiel la francaj kodaj estas en nia franca lando la disciplino de ĉiuj, kiuj loĝas aŭ ĉeestas en ĝi; Tribunalo

Medito en Tombaro.

En nia urbeto, plenplena de kafejoj kaj drink-ejoj, sola loko, kiun ne malpurigas homa brutvivo, estas... tombaro, la urbo de mortintoj. Tie mi ofte promenais inter la monumentoj kaj floroj, tie mi kutime esploras angoron de l' vivo. Hodiaŭ min persekutas fama diro de Siller: »La mondon regas malsato kaj seksamo.«

Unue pano, ventro plenigita. Poste... senhonta kuro por seksaj ĝuaĉoj. Jen estas du aktoj de l' homara tragikomedio, ludata ĉiutage... en ĉiuj truoj de l' kvin kontinentoj. Kaj ankoraŭ? Nenio plu? Jes, nenio plu... almenaŭ por la ordinaraj homoj. Ĉio cetera en la tragikomedio estas nur akcesoraj, dekoracioj, ornamentetoj: amo, fideleto, sincero, noblo, sindono, puranimeco...

Dum mi senespeze meditis pri tiuj malĝojajoj, pri mizero de la vivo... subite ekkantis najtingalo kaŝita en la arba denso. Mi levis la kapon, ekaŭskultis mirindeblan arion, kiu trapenetris ĝis mia koro, — samtempe varma aerblovo alportis dolĉan odoron de l' siringo, kiu vekis en mia memoro belajn horojn el mia infanaĝo... Mi vigle levigis, facile ekspiris, kaj ekiris al la urbo, mallulte murmurante: »Jes ekzistas io vivinda, io bela, vera kaj bona, io eterne dieca!« Kaj mi kun novaj fortoj reeniris la vivon.

Danubano.

Infano en la lulilo.

Dediĉita al Zanoni.

En miaj manoj la pezo ne pezas,
En okuloj la spaco ne havas distancojn,
En oreloj tonandoj ne havas longecon
Kaj kunfandiĝas ĉiuj tempoj kaj mezuroj.

kaj Asizujantaro internacia poste, por apliki tiun juron, kaj ĵure monda Polico por ĝin respektigi kaj ekzekuti la deĉidojn de la Tribunalo kaj de la internacia Asizujantaro.

Sed al kiu estos la honoro komisiata starigi la mondan Konstitucion por difini la devojn kaj la rajtojn de la popoloj, kaj por krei la organojn, kiuj devos ilin respektigi kaj ekzekuti? Komprenable al la nuna Ligo de Nacioj, kiu jam enhavas konstantan internacian Kortumon, kaj kiu feliĉe havas en sia regularo la necesajn povojn ampleksi ĉiujn popolojn kaj fariĝi per tio mem la vere ĝenerala Societo de l' Nacioj, kiu sola kapablas efektiviĝi la idealon, kies rapidan ekplanon ni ĵus donis.

Neniam dato ol tiu de 11. nov., dum kiu oni devas inaŭguri la monumenton difinitan por senfine daŭrigi la memoron de l' solena traktato, kiu ĉesigis la teruran militon de 1914—1918, estas pli favora por permesi al ĉiuj, kiuj malamas la militon, proklami ilian deziron konservi de nun por ĉiam la pacon.

Kaj jen kiel ni permesas al ni petegi ĉiujn amikojn de l' Paco, ne nur en nia lando sed en la tuta mondo, ke ili laŭtigi sian voĉon por postuli por ĉiuj al ili eblaj rimedoj la kiel eble plej baldaŭan starigon de la »Vere Ĝenerala Societo de l' Nacioj«.

Por la departementa Komitato de l'Oise (Francujo) de la granda universala Asocio „Por forigi tiun krimon: La Milito“.

La ĝenerala sekretario

L. Demarcy

Juroscienco Licencianto
Prezidanto-fondinto de la Beauvais'a Esperantista grupo.

Grava Internacia Kunveno en Italio?

La Centra Komitato de Itala Esp. Federacio, sciante pri la deziro de UEA organizi Internacian Kunvenon aŭ Konferencon por Esp. en Komercio, sendis inviton al la Estraro de UEA, proponante, ke la Konferenco mem okazu en Italio dum tuj venontaj Paskfestoj. Al tiu celo oni indikis urbon de Nord-Italio tre taŭga por naturaj kaj artaj belaĵoj kaj kiel centron de ekonomia interŝanĝado por allogi la samideanojn el ĉiu eŭropa kaj ekster-eŭropa lando. Ekzistas motivoj, kiuj supozigas, ke la Estraro de UEA konsideros la proponon kun konsentemo. Des pli ĉar oni esperas en sama okazo, ke la en Helsinki projektita 3. Konferenco Int. de l' Specimen-Foiroj ankaŭ okazus en sama urbo kaj periodo.

La Esp. Sekcio de la Popola Universitato de Plzen en Belgio.

Grupo de 16 ge-Esperantistoj, membroj de la Popola Universitato de Plzen (Ĉeĥoslovakujo), kondukita de s-o Bedr. Tittl, vizitis Belgion. Ili alvenis en Bruselo 23. okt. S-o Van Vynckel gvidis ilin kaj zorgis por ĉio necesa dum la restado de la ĉeĥoslov. geamikoj en la belga ĉefurbo. La 25-an matene ili alvenis en Antverpeno. Ĝe ili estis akceptitaj en la stadiono de s-oj Frans Schoofs, M. Jaumotte, Prez. kaj Kasisto de la ĉeĥa grupo »La Verda Stelo«, J. Swalf, Prez. de la Antv. Gr. de Esperantistaj diamantistoj, A. Baesens, sekr. de la Mehlena grupo, J. Van Schoor, Urbach, k. a. Kondukita al sia hotelo, pri kiu zorgis la Antverpenaj amikoj. La gastoj komencis tuj sian promenadon en la skeldurbo kaj vizitis, dank' al s-o Swalf, la plej modernan diamantpolurejon de la loko. Posttagmeze ili admiris la belajn kolektojn en la fama Zoologia Ĝardeno de Antverpeno, kaj post la vespermanĝo ĉiuj belgaj kaj ĉeĥoslovakaj samideanoj havis intiman kunvenon en Café Anselmo, dum kiu oni familie babulis, deklamis, kantis kaj dancis, kaj en kiu ankaŭ partoprenis s-o Isbrücker, prezidanto de la Nederlandaj Esperantistoj kaj ges-oj Sindhwad el Brita Hindujo. La 26-an matene okazis sub gvido de s-o Schoofs detala vizito de la grava haveno de Antverpeno; la ĉsl. amikoj promenigis ĉirkaŭ la vastaj dokoj kun iliaj ĉiuspecaj imponaj instrumentoj de ŝarĝ- kaj deŝarĝado, vizitis la

Ne, antaŭ mi ankoraŭ fariĝas
La giganta Kreado: mi sentas, mi vidas
Ankoraŭ ne ekzistas pezoj
Nek formoj, nek spaco, nek tempo.

Kaj kiel milionoj da mirakloj
Svingiĝas antaŭ mi de la naturo.
Kiel la tonoj, koloroj, gustoj
Flugetadas sur senfinaj skaloj.

Kiel ĉio kreiĝas, detruigiĝas,
Kiel la suno supren kaj malsupren iras,
Kiel fluidiĝas la malmola ŝtono,
Kiel glaĉiĝas la varmega gelsir'.

Kiel mi suferas kaj kiel mi ĝojas,
Kiel mi amas kaj kiel mi trompiĝas,
Kiel min svingadas sur senfina ŝtuparo
Mia sentado teren kaj ĉielen.

Kiel ĉio muzikas kaj murmuradas,
De „pianissimo“ al „fortissimo“
Kiel ĉiuj koloroj kunfluas,
Kiel ĉiuj tonoj iremige ekiĝas.

Kiel mia korpo senfortiĝas, okuloj
Blindiĝas, oreloj surdiĝas, mia
Buŝo kunmiksas la gustojn kaj
Nigra kurteno falas antaŭ mi:
Ho mi min sentas tiam ĉi kiel
Senfina infano en senfina lulil'
Kiu ne videbla mano luladas
Kantante mallulte — kaj nekompreneble.

Aladar Bán.

Rememoroj de malnova sofo.

Rakonto bazita sur vera okazintaĵo de Jerzy Rola.

„Se vi, sinjorino, deziras, ke mi ion aŭdu pri viaj multvaloraj konfidadoj, bonvolu paroli pli laŭte, mi petas.“

La malnova sofo tripeida (la kvara piedo mankis), ordigante sian pozicion, ŝovetis sin pli

plej grandan sekan dokon kun riparata ŝipo, gvidata de tute hazarde renkontitaj Esp. policano kaj havenoficiro. Trapaŝinte la originalan kaj malnovan ŝipistan kvartalon, la ekskursantoj ĝuis duonhoran ravan veturadon per motorboatoj sur la riverego Skeldo. Poste ili vizitis la historian urbodomon, kie s-o L. Ritschie, Direktoro de la urba oficistaro, gvidis ilin kaj havigis al ili en nia lingvo ĉiujn detalojn pri la konstruaĵo kun ĝiaj diversaj interesplenaj salonoj. Tiu promenado finiĝis per aperiĝo sur la turo de la belega katedralo, de kie oni ĝuis ravan panoramon super la tuta urbo. Posttagmeze multnombraj Antverpenanoj kondukis siajn ĉsl. amikojn tra la mondfama historia muzeo »Plantin-Moretus“.

Vespere okazis en »Café Suisse« granda fest-kunsido kun parolado kun lumbildoj pri Ĉeĥoslovakujo. Ducent personoj ĉeestis tiun vesperon. S-o Tittl parolis en Esperanto pri la historio, geografio, kostumoj kaj kutimoj de sia lando, kaj s-o Schoofs tradukis flandren tiun interesplenan paroladon por la ne-Esperantista publiko kaj kompreneble profitis tiun okazon, por fari viglan propagadon por nia lingvo. La »Reĝa Soc. de Fotagrafaj kaj Sciencaj Studoj de Antverpeno« afable kunlaboris en la organizo de la parolado, post kiu la ambaŭnaciaj samideanoj tre longan tempon gaje kunsidis interfratiĝante kaj kantante siajn hejmajn kantojn.

La karavano forlasis Antverpenon la 27-an matene, por viziti ankoraŭ la urbojn Ostendo kaj Bruĝo.

Vidajkartoj.

El ĉeĥa lingvo tradukis Jos. Paŝa.

Antaŭ kvindek jaroj la kuprogravuristo F. Rodrich pretigis la unuan vidajkarton. Tiu ĉi produktajo de la paperaĵa industrio tre rapide disvastiĝis.

Post la mondmilito ekestis en multaj ŝtatoj granda multekosteco de la vidajkartoj, sed la sperto provas, ke oni tro kutimiĝis al la vidaj-kartoj kaj ke neniam ĉirkonstancoj povas malhelpi ilian evoluadon. La industrio, okupiĝanta per fabrikado de vidajkartoj, akiris tian amplekson kaj nutras tiom da teknika personaro eĉ el artistaj rondoj, ke la ciferoj ĉiun surprizas.

La vidajkartoj fariĝis tre grava objekto en nia vivo, preĉpe en la libertempa kaj turista vivo, ke sen ĝi ni ne povus imagi la vivon.

En la antaŭmilita tempo la sumo da mono spozita por vidajkartoj ne estis tiel granda kiel nun kaj farante la budĝeton por vojaĝo, oni devas krom la manĝaĵo kaj hotelo kalkuli certan sumon por vidajkartoj, ĉar nun iliaj prezoj prezentas atentindan elspezon.

Vizitu iun ajn plej malproksiman angulon de la mondo, certe ĝi estas bildigita sur vidajkartoj, kaj ekzistas eĉ ne unu ruino aŭ bela pejzaĝo, kie ne estus sidanta homo, skribanta vidajkartojn kaj pene pripensanta, al kiu el siaj amikoj ili ankoraŭ sendu karton por neniu ofendi, aŭ al kiu ili adresu la dekan vidajkarton el la aĉetita serio, ankoraŭ ne uzitan.

Ĝi estas la plej simpla rimedo fere montri al niaj konatoj, kie ajn ni estis, kaj, ke ni fartas bone, ke ni vojaĝas tra la mondo; ĝi estas la plej bona rimedo vekii en nian kaj pruvii nian respekton.

Komprenable la vidajkartoj kiel ĉiu konvencia kutimo povas kaŭzi suferadon al tiuj homoj, kiuj en la sendado de vidajkartoj kaj respondado al ili vidas neeviteblan postulon de la societa ĝentileco.

La disvastigon de la vidajkartoj kaŭzis tio, ke ne estas necese multon skribi sur ilin.

Ĉion diros aŭ ankaŭ ne diros la bildo. Sufiĉas kelkaj linioj en telegrafa stilo.

proksime al la muro — ĉar tie ŝi povis pli oportune stari, apogante sin je la muro — kaj malfavore ekrigardis la samovaron, starantan en la alia angulo.

„Kaj vi, sinjoro, certe jam surdiĝas pro maljuneco,“ ŝi respondis malice, „sed fajfi vi ankoraŭ ne forgesis — brrr — kia terura kutimo estas tio!“

„Ne ofendu min, sinjorino,“ rediris la granda kaj bela samovaro, staranta sur fablo ĉe la forno, „vi ja scias bone, ke tio ne estas fajfado; restis iom da akvo en mia ujo, kaj la fajro ankoraŭ ne estingiĝis, pro tio mi tiel mallulte devas zumi. Cetere vi ja tute ne bezonas paroli kun mi; pli volonte mi deziras aŭdi la kanton de l' bolanta akvo ol peziĝi mian kapon per viaj konfidadoj.“ Tion dirinte, la samovaro ekridetis malesteme kaj jam estis komenca interparolado kun sia propra submetajo, kiam la sofo timante, ke ŝi nun devos silenti kaj perdos amikon por interbabilado, ekridetis paceme kaj plu parolis agrablavoĉe:

„Mi tute ne intencis vin ofendi, sinjoro, sed vi vidas... ke mi ja ne povas paroli tiel laŭte... mi estas maljuna.“ Kaj tra la disŝirita matraco elŝutiĝis du fontetoj da segaĵo, kiuj por la malnova sofo signifis nenion alian ol... larmojn. Ekvidinte tion, la samovaro ekkompatis la amikinojn.

„Nu, nu, ne ploru, sinjoro! Mi ne ŝatas, se virinoj kaj sofoj ploras. — Diru, kio do estas plu?“

La sofo, tre kontenta, ke ŝia maljuna kunulo rekvietiĝis, sin premis komode al la muro, kaj daŭrigis la komencitan rakonton:

„Post unu semajno oni vendis min aŭkcio, kaj mi aĉetis bienposedantino. Mi ekvojaĝis en vilaĝon... Tie en nova hejmo mi esperis vivi trankvile, sed... tio ne okazis. En tiu domo mi travivis la plej teruran momenton de mia vivo kaj ĝuste tion mi estis rakontonta al vi:

Tial ankaŭ oni vidas, ke la stilo de la leter-skribado estas rimarkinde difektita de tiu tempo, kiam estis enkondukataj korespondaj kaj vidaj-kartoj.

* * *

Tiu ĉi artikolo koncernas ne nur la samlandanojn, sed bedaŭrinde ankaŭ la geesperantistojn, kiuj ankaŭ precipe sur poŝtkartoj uzas tiel nomatan telegrafan stilon.

Multaj niaj gesamideanoj publikigas siajn adresojn en Esperantaj gazetoj kaj diversaj adresaroj, sed forgesas, ke la morala devo estas respondi. Aliaj respondas, sed nur per mallongaj respondoj, ekzemple:

„Mi dankas al vi pro via bela karto kaj salutante vin kore, mi restas...“

Sur ĉiu karto estas surskribo kaj ofte pli longaj priskriboj presitaj en nacia, por aliaj nekonata lingvo. Mi rimarkigas, ke eĉ la plej bela karto estas senvalora, se oni ne scias, kion ĝi montras.

Laŭ mia opinio la korespondado per poŝtkartoj estas nur interesa, se ni ekscios ion novan por ni nekonatan. Tre grava afero por korespondantoj estas konatiĝi kun la kutimoj, historio, geografio ktp. de aliaj landoj kaj popoloj.

Tial, gesamideanoj, se vi publikigas viajn adresojn, viaj moralaj devoj estas 1. respondi, 2. priskribi la bildon de la karto kaj sciigi ion interesan al via korespondanto!

J. P.

Komercio.

Foiroj kaj ekspozicioj dum novembro 1922.

1.—15. II. Jara foiro por nutrado en Dijon.
4.—13. Ekspozicio de aŭtomobiloj en London.
8.—18. Ekspozicio de aŭtomobiloj en London.
29. Ekspozicio de motorbicikloj en London.

Niaj

literaturaj manuskriptoj.

Ricevitaj:

149. Saluto al XIV-a Kongreso (orig. M. S. en Skolpe).
150. Linepa (Mallerta). 151. La internacia metodo de R. A. Fanta, Tragedio de l' homo (Madach), Mi mieras... (Mihaly). 152. La tri kisoj (Nulin). 153. Silenta amo (Boehm). 154. La verda stelo (Győr). 155. Kanteto por Zinjjo (J. v. Sch.). 156. Hungaraj anekdotoj (S. Elek). 157. Mittag Leffler (Beke). 158. Penseroj (Kluza). 159. Pythagoraj Maksimoj (S. Fr.). 160. La novaĵoj de la leĝo (P. W. van den Br.). 161. Ĉu ŝtono aŭ pano (Gale). 162. Multiproŝta entrepreno (Averĉenko). 163. La ekkulturisto (Tuglas). 164. Patrujo mia! 165. Deziro (S. M. Sim.). 166. Babelo (Gyenes). 167. Aŭskultu (Oles). 168a, b. Infano en la lulilo (Kanto). (A. B.). 169. La arbo de l' paco (T. B.). 170. Tri reganoj (V. Auburlln). 171. La ventego (Bialik). 172. Rumana skizo (Isac). 173. Skizoj el la antikva Bulgario (Rajnov). 174. La veto (Gr. L.). 175. Al la memoro de L. Einstein (L. Z.). 176. Sonatino (Dario). 177. Kristnaskovespero (Baekelmana). 178. Hans Sachs (Ricardo Leon). 179. a, b, c, d, e. Marellia vino (Machar). Tomb-sarkribo en Romo (Machar), Antikva prientempo (Machar), Dia volo (Machar), Parabolo pri la eliaj prezoj (Barton). 180. Vivo (V. Iv.). 181. La du poemoj (A. V.). 182. El Kalevido (Kreutzwald). 183. Tio estas vi mem! (Kivikas). 184. En la fino de l' mondo (Tuglas). 185. La nokto „Ukraina“ (L. C.) 186. a. b. En malyajeco, La vivo foriras (B. B.). 187. Spritaĵoj de Nazredinhoĝa (M. A. S.). 188. Lirika momento de l' animo (B. B.). 189. La Dino de l' Justeco (Sv. S. P.). 190. Mezepoko (V. O.). 191. Ni estas geaktorj (V. O.). 192. Malepero (P. B.) 193. Kelkaj labeloj de G. E. Lessing (M. K.) 194. Ĉu ekzistas perfekta felico? (G. St.). 195. Malfeliĉa amo (G. G.). 196. Kiamaniere mi rekonsciigis pri mia ekintereso por Esperanto (C. Br.). 197. Vi (Krivoruĉko). 198. Pri sirangaj bongustaĵoj (Weiten). 199. Kapo kaj aviafotografio (A. S.). 200. La sonoriloj plendas... (Tousseul). 201. International Language (Strong). 202. Tri aviaj kantoj (Joŝ). 203. La mediumo de hipnotismo (Tower). 204. Jean Paul pri virino kaj amo. 205. Senvalorigo de l' mono en la antikva Ateno (Radermacher). Al paŝanta somero (A. J.). 207. Pinkus Rozenberg (Averĉenko). 208. Semper idem (London). 209. Rememoroj de malnova sofo (Rola). 210. Morskio oko (pola tradicio). 211. La aglo kaj la suno (Wyslouch). 212. La fuganto (A. M.-K.). 213. Dumnokta motorbicikla veturo (K. Br.). 214. La dikkapulo (Vazov). 215. La trompema lifto (K. M.). 216. La konfliktio (K. M.). 217. La uragano (J. B.). 218. Revoluciaj Diol, Interkapitoloj (I. B.). 219. Nokto. 220. Arbara reĝo (Goethe).

Tio okazis en la jaro 1863; ilam estis tre malkvietaj tempoj, ĉar la januara revolucio disvastiĝis plej forte. En nia bieno neniu nokto pasis trankvile. Polaj soldatoj noktumis sekrete; la inoj fadenigis malnovajn tolaĵojn kaj kudris bandaĝojn; okazis sekretaj kunvenoj, oni kaŝis armilojn kaj ŝarĝojn, kaj krom tio... moskvaj soldatoj reviziis tre ofte la domon, ĉion malordigante... ofte ili eĉ arestis kelkiun.

Mi staris en la dormoĉambro de l' posedantino, kiu tre konfidis al mi, ĉiam kaŝante en mia malsupra tirkestio diversajn malpermesitajn librojn, aktojn kaj ofte eĉ uniformojn. Lutage ŝi kaŝis en mi kvar tre pezajn pakojn de plumuja grandeco, envolvitajn en cikorisimila papero. Tuj mi rimarkis, ke tio estas pulvo! Mi ektemis pro timo, konsiderante, kian grandan trezoron oni kaŝis en mi.

Unu semajno forpasis trankvile, kaj mi jam esperis, ke la moskvanoj eble rezignos je plua revizioj, kiam foje mi ekaŭdis... tintadon de sabroj kaj spronoj, kaj post iom da tempo enkuris kvar soldatoj, gvidataj de oficiro. Mi rigidigis... mi sentis la febre tremantajn risortojn de mia matraco kaj la senatente teren falantan segaĵon...

Mi ekrigardis mian posedantinon. Ŝi staris ridante kaj ŝajne tute forgesis pri la ŝarĝoj.

La revizio preskaŭ finiĝis, kaj mi jam estis kviete ekspronta, kiam... la oficiro ekrigardinte min, ordonis:

„Reviziu ankaŭ tiun ĉi keston!...“

Oni malfermis la tirkeston... Pala kiel mortulo mi levis miajn okulojn por observi mian mastri-non, kaj en la sama momento mi rimarkis, ke ŝi ekmemoras pri la objektoj kaŝitaj en mian tirkeston antaŭ kelkaj semajnoj. Sed nun okazis io neatendita... ĉar mia posedantino, ne perdinte sian spiritĉeeston, rapide proksimiĝis al mi kaj,

Birdeto (Majkov), Montaj pintoj (Lermontov), Dronito (Puškin), 221. La roko (Heine), 222. Paradizo (M. S.), 223. Epitafio (M. S.), 224. Rememoro, Roza kaj koro, Adiabo (M. S.), 225. La donaco de l' fantomsenoj (K. J.), 226. Cerizfloro (T. M.), 227. Paskaj popolaj kutimoj en Ukrainio (Bačinskij), 228. Diversaj spritaĵoj (B. A.), 229. Enigmoj (B. A.), 230. Rusaj proverboj (B. A.), 231. Vintira espero (Altenberg), 232. Spite ĉion (L. L.), 233. Vi scias, kion la vivo postulas? (B. B.), 234. Kataro (J. Ev. Sch.), 235. Egoismo (J. Ev. Sch.), 236. Mangleblaj fungoj (J. Ev. Sch.), 237. La du rivaloj (J. Ev. Sch.), 238 a, b. Serĉo matematika spritaĵo. (J. Ev. Sch.), 239. a, b, c, d. Al kara tombo, La kunfratigo, Izoleco, Kien ajn mi venas (Nora Kln.).

Aperos:

158, 164, 166, 167, 168 a, b, 169, 170, 171, 172, 173, 175, 178, 206, 207, 208, 209, 210, 211, 212, 215, 216, 217, 218, 219, 221, 222, 225, 226, 227, 228-229-230 (parte uzablaj), 231.

Ne aperos:

149 (tro malfrue), 180, 181, 182, 183, 184, 185, 186, 187, 195, 196, 197, 198, (tro longa), 199, 200, 201, 202, (jam aperintajn verkojn ni ne represas), 203, 204, 205, 213, 214 (jam aperis en E. B. T. n-o 13), 220, 224, 232.

Pri la ceteraj manuskriptoj ankoraŭ ne estas decidite.

Mallongaj Sciigoj.

Tri Esperanto-Tagoj en Zittau (Saksujo).

La tri Esp. tagoj, kiuj okazis 6.-8. okt. en Zittau, bone sukcesis. Ili komencis per la malfermo de tritaga ekspozicio en la tekslernejo. Tre bone efikis je la raportistoj de la loka gazeto speciala anguleto, en kiu troviĝis po unu ekzemplero de la Zittau'aj gazetoj, kiun la gvidantoj signifikis per „Niaj kunhelfantoj“. Tion oni ankaŭ laŭdis en la raporto de la „Zittauer Nachrichten und Anzeiger“. La enirejon de la ekspoziciejo ornamis la statuo de la Majstro. Antaŭ ĝi kuŝis la „Fundamento“. — La 6-an vespere okazis varbparolado de s-o Ing. Scholze el Reichenberg, direktoro de la tiea folio, kiu bedaŭrinde ne estis tiel bone vizitata, kiel meritis la bona parolado de la oratoro. — La sekvintan tagon alvenis la eksteraj partoprenantoj je la 11. fondiĝfesto de la „Societo Esperanto“, inter ili malgraŭ la limbarado kontraŭ Ĉeĥoslovakio multaj ĉeĥoslovakoj kaj hungaraj samideanoj s-o Klein. La festo okazis en belega parkrestoracio. Ĉeestis preskaŭ 350 personoj, inter ili proksimume la duono estis Esperantistoj. Bona orkestro, beleta teatraĵo, ludita de la Reichenberg'aj samideanoj, kaj multaj aliaj amuzaj kaj kaŭzaj tre bonan humoron. Poste sekvis la festballo, dum kiu oni valsis la tutan nokton ĝis tagiĝo. Salonpoŝto kaj lotumo amuzis speciale la nedancemulojn. — Dimanĉe, la 8-an okazis krandonado por la mortintaj Zittau'aj Esperantistoj kaj poste liberreligia dimanĉsolenado. Sekvis la ekzamenoj. Je 11 h. antaŭtagmeze koncertadis la urba orkestro antaŭ la ekspoziciejo. Je ĉiuj tria paŝo oni renkontis Esperantistojn. Tio estis bonega propagando kun forta efiko je la vizito de la ekspozicio. — Per „amika kunveno“, kiu bedaŭrinde ne povis esti daŭrigata pro ega malvarmo en la ĉambrego, finiĝis la bela festo, kaj verŝajne ĉiuj forveturis kontentegaj.

Por la propagando la festo helpis multe. La gazetoj jam depost semajnoj aperigis artikolojn pri ĝi kaj pri la tuta movado. Inter aliaj ankaŭ gratulis la unua urbestro kaj la rektoro de la humanista gimnazio. La grupo mem ne evitis grandajn elspezojn rilate al ĉiumaniera reklamo. En ĉiuj kinematografetoj estis lumbildoj videblaj, grandaj anoncoj en ĉiuj gazetoj atentigis je la ekspozicio. Librovendejo ekspozicias Esperantaj verkojn kaj lernolibrojn ktp.

Estus rekomendinde, ke ankaŭ aliaj urabaj grupoj, kiuj ne havas okazon inviti kongreson aŭ aranĝi similajn impresplenajn demonstraciojn, okezigu tiajn propagandefestojn, je kiuj certe kunhelpos la tuta ĉirkaŭaĵo. Nur per forta propagando oni povas atentigi la dubemulojn je la grandeco de nia movado. Koko.

Essen.

S-o Pillath, ekzamena komisaro ĉe la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, finis

antaŭ kiam iu sukcesis ekpreni la kvar pulvopakaĵojn, ŝi jam tenis ilin en la mano, kaj altlevante ilin ŝi proksimiĝis ridetante per malpeza movo sentime al la oficiro.

„Kio estas tio?“ ekkriis la oficiro, kaptante ŝiajn manojn...

„Ĉu vi ne konas ciklorion?“ gaje demandis la kuraĝa virino, „mi kaŝis le la kvar pakaĵojn kaj serĉis ilin poste en la tuta domo, ne povante ilin trovi... nur nun...“

La oficiro foriris sian manon; li eĉ ne pensis, ke la pakaĵoj, per sia eksteraĵo trompege ciklorisimilanta, povus esti tiel pezaj, ke la virino ilin apenaŭ povis teni, kaj povus enhavi ion alian...

Li foriris el la bieno, ne trovinte ion suspektan — Sed mi, kiel vi vidas, sinjoro, de tiu tago maljuniĝis je multaj jardekoj, daŭre tremetas miaj risortoj en la matraco kaj el la okuloj mi fluigas larmojn — segaĵoj. — Mi ne estas tiel kuraĝa, kiel tiu pola virino... bedaŭrinde... mi estas nur... sofo...“

Ŝi eksilentis, kaj el la fruaj elmorditaj per itneoj ŝutiĝis novaj torentetoj de segaĵoj.

La samovaro rigardis kortuŝite sian maljunan amikinojn. — Silento ekregis en la malnova ĉambro, kaj nur la akvo sur la forno aŭdigiĝis sian zumon — kantante iujn mirigajn, ne kompreneblajn melodiojn...

El pola lingvo tradukita
Fra-Legnerp.

Germanaj poŝtabonantoj!

Bonvolu nepre atentigi, ke ni tute ne povas atentigi viajn sciigojn rilate al adresŝanĝo aŭ viajn reklamaciojn. En ĉiuj aferoj, kiuj koncernas la liveradon de ET vi turnu vin nur al via poŝtoŝeĉo.

ĉe „Akademij Kursoj“ (oficiala urba instituto) duan progresigan kurson kun 25 persistintaj, nun perfektigitaj Esperantistoj; samtempe li komencis novan kurson kun 47 partoprenantoj ĉe la sama instituto. — Je la fino de novembro okazos ekzamenado „pri kapableco“ (adreso: Ekzamena Komitato, Essen, Kahrstrasse 47).

Donacoj por malsatantaj rusaj samideanoj kaj por „Esperanta Ligilo“.

Lastatempe alvenis granda donaco de membroj de la Esperantista Klubo en Praha I, Kafejo Edison: 1000 kĉ. por malsatantaj samideanoj; krome donacis s-o C. Th. en Köln-Kalk 10 gmk. kaj s-o C. S. en Dortmund 200 gmk. — Por „Ligilo“ ni ricevis 25 gmk. de Stuttgarta Esp. Stelo.

Ligo de germanaj Esperanto Societoj en Ĉeĥoslovakio.

La distrikta Unuiĝo de germanaj Esp. societoj en Silezio kaj Norda Moravio aranĝis imitindan propagandan vojaĝon. Por tiu celo ili elektis s-on Taubmann el Haida kiel oratoron. La unua parolado okazis 20. sept. en Freudenthal, la dua 21. sept. en Jägerndorf, tria 25. sept. en Römerstadt, kvara 26. sept. en Freiwaldau, kvina 27. sept. en Troppau, sesa 28. sept. en Mährisch-Osttau, sepa en Oderfurt/Přivoz.

Al la sukceso de la oratoro multe helpis la bone aranĝita kaj kunmetita ekspozicio migranta de la Distrikta unuiĝo de germanaj Esp. societoj. La grupoj de Gablonz aranĝas novajn kursojn en Gablonz, Grünwald, Johannesberg, Reichenau, Morchenstern, Wiesenhal, Maffersdorf, Bad Schlag, Seidenschwanz, Kukan Swarow.

En Reichenberg komenciĝis kurso por komencantoj. La grupo preparas kurson en Kratzau.

La Esperantan Lernejon en Plauen (Germ.) Inspektis 19. okt. Gewerbeschulrat Calletsch de la Saksia Ministerio. Ĉi tiu lernejo, kies gvidanto estas nia fervora samideano Guido Otto, estas submetita al la Wirtschaftsministerium. S-o Calletsch mem jam lernis Esperanton en la jaro 1909 kaj estis surprizata pri la sukcesplena instruado de la lernejo, kiu ĝis nun havis pli ol 1200 lernintojn. Nuntempe estas instruataj 130 infanoj kaj 50 plenkreskuloj el la plej diversaj profesioj.

Depost 12. okt. la grupo en Plauen kunvenas ĉiun jaudon depost la sepa vespere en sia propra hejmo, Gotschaldstr. 25, III. (angulo Karlstr.). Kvankam ĝi ne estas tuta domo, tamen ĝi estas bela, dum la vintro varmigata ĉambro en la loĝejo de la „Unuiĝo de Kristanaj Junaj Viroj“. Esperantaj gazetoj elpendas, Esperanta biblioteko estas je dispono. La Plauen-anoj ĉiam kore ĝojas, kiam Esperantisto aŭ Esperantistino el alia lando aŭ alia urbo ilin vizitas.

Esperanto en Italio.

Terni. — Solena inaŭguracio de la grupa flago okazis ĉi tie 15. okt. en la ĉefa teatro „G. Verdi“, kiu estis plenplena de aŭtoritatoj kaj interesigantaj urbanoj al nia ideo. Al bela festo partoprenis ankaŭ eksterurbaj samideanoj, inter kiuj la eminentaj prof. Caroli kaj prof. Migliorini el Romo, kiuj prezentita per belaj vortoj al la publiko de s-o Rag. Bocci, estro de la loka grupo, diris la ĉefparoladojn. F-ino Lina Caporali, baptopatrino de la belega standardo, per trafa parolado transdonis ĝin al la estraro de la grupo. Estonta VIII-a nacia Kongreso de la Italaj Esperantistoj okazos en Terni en 1923.

Trento. — La 15. nov. loka, ĵus starigita Trentuja Esperanto Instituto malfermos publikajn kursojn en la popollernejoj; gvidos ilin s-o prof. D-ro Dante Quarta.

La Esperanto Gruparo Berlin

aranĝis 2 grandajn propagand-vesperojn. La 10. okt. Prof. Dletterle oficiale parolis pri la temo „Esperanto vor einem internationalen Forum von

Nokto.

Dediĉita al Nina A.

La suno jam de longe subiris.

Miloj da steloj palpebrumas sur la nigra ĉielo. La pala luno ridas, kvazaŭ ĝi volus konfesi ian sekreton al la tero: silentu, aŭskultu...

Kaj la tero eksilentas. Nur aŭdiga murmurado de torento, brueto de arboj, tremigataj per facila venteto; iajfoje ektrilas najtingalo, le en kampo paŝisteto ludas sur ŝalmeto salika, kaj ĝiaj tonoj, jen malgajaj, jen revigaj, sonas milde, resonas grandioze en la dormanta arbaro, kuras al la torento kaj pereas en ĝiaj ondoj...

La tero dormas, la tero revas...

Kaj la lumo rakontas... Ĝi flustras senvortan aman konfeson, karesante la teron per argentaĵo radioj, kaj la tero ĉirkaŭblovas ĝin per ama spiro, kaj kisas ĝian ridetantan vizaĝon.

Subite nubo kovras la lumon. Malbonstigna ombro ekfalas sur la teron... Ĝi pasas, kaj la luno eliĝas kun rido el post la nubo.

Ree karesoj, ree ĝojo...

Tiel ilin renkontis la proksimiĝanta malamiko. Ĝi aperis en la oriento; en la komenco pala ĝi, poste ĝi pliruĝiĝis, kvazaŭ kolera, ke ĝia amata tero troviĝas en la brakoj de ĝia malamiko, la luno...

La luno ekvidas la danĝeron. Ĝi rapide adiaŭkisas la teron, al ĝi promesante, ke ĝi revenos. Ĝi lasiĝo ĉirkaŭprenas la teron kaj forkuras.

La unuaj radioj de la suno vekas la teron el la volupta rizado al la realeco, al zorgoj, al ŝvita laboro...

Originale verkita de
Pseudonimulo.

Schulmännern“. En tiu ĉi parolado, speciale aranĝita por la Berlina instruistaro, delegitoj de diversaj lernejoj oficelaj partoprenis. Inter aliaj Schulrat Dageförde deklaris, ke la urbo Berlin permesas la Esperanto-instruadon en ĉiuj de la „Wahlfortbildungsschulen“.

La 23. okt. okazis dua granda propagand-vespero kun parolado de D-ro Steche pri la temo „Esperanto kaj la germana popolo“ en la granda salono de la hejmo de „Verein Deutscher Ingenieure“. Pli ol 200 personoj, inter ili ankaŭ reprezentantoj de la „Kultusministerium“ kaj diversaj registaroj kaj grandaj firmaj aŭskultis kun intereso la bonegajn eldirojn de D-ro Steche, kiun sekvis vigla diskutado. [Por tiu ĉi propagand-aranĝo oni forsendis invitilojn al ĉiuj ŝtataj, urbaj ktp. registaroj, kaj la prezidanto de la germana respubliko kaj diversaj aliaj oficistaroj oficiale dankis por la invito. — Dua sukceso estas la fakto, ke la granda ligo de teknikaj sciencaj unuiĝoj promesis subteni la Esperantan movadon, speciale la Germanan Esperanto Instituton en financa rilato. H. N.

Esperanto en Nederlando.

La 7. kaj 8. okt. okazis en la Konstruado de la Nederlanda Katolika Popolligo en Hago ekspozicio de diverslandaj Esperantaj revuoj kaj gazetoj, lernolibroj, originale verkita kaj en Esp. tradukita libroj, bildkartoj el la tuta mondo kaj aliaj Esperantaj; ĉio bone aranĝita de la Hago Katol. Unuiĝo Esp., kiu el la vizitintoj povis noti 20 novajn membrojn.

Per la klopodoj de la Esp. grupo „Fine ĝi venkos“ en Hago estis aranĝitaj Esp. kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Speciala kurso por la anoj de la Nederlanda Turistasocio en Hago.

La Popoluniversitato en Rotterdam organizis du kursojn de Esperanto dum tiu ĉi vintro. En la unua, gvidata de s-ino J. C. Isbrücker, partoprenas 53 ĝelernantoj.

Maldekstre de la stacidomo de la Elektra Fervojo en Rotterdam vidigas ĉiuvespere sur tegmento de apuda alta domo brila lumreklamo. Ĉiujn du minutojn oni ekvidas en grandaj helaj literoj holandlingve la vortojn: Lerne Esperanton.

Esperanto en Estonio.

La 22. okt. en universitata urbo Tartu (Dorpat) ĵurnalistoj Vadim Anofrijev paroladis publike pri granda kultura signifo de Esperanto. La oratoro multe parolis pri la laboro de Ligo de Nacioj, manifesto de pedagogoj kaj komercaj ĉambroj, favoraj al Esperanto. Fine li rakontis, kiel li dank' al la verda stelo, estante en malbona financa stato, kiel elmigrinto, sen mono, kun poŝtmarkoj en la poŝto faris el Estonio sukcesplenan vojaĝon por viziti la XII-an en Hago. La amerika salono de Kristana Asocio de Junaj Homoj estis plena de aŭskultantoj, inter kiuj troviĝis eminentuloj de la urbo: eksrektoro de Universitato, prof. Aleksejev, poeto kaj fama muzika kritikisto Karl Hunnius. Post la parolado s-o Anofrijev montris kaj klarigis sian ekspozicion da libroj, gazetoj kaj ĵurnaloj. Ĉiutagaĵo ĵurnalo favore raportis, kaj unu plej grava el ili, „Postimees“, skribis, ke estas dezirinde ripeti la paroladon.

Esperanto en Libera Urbo Fiume.

Kvankam Esperanto en ĉi tiu urbo antaŭ kelkaj monatoj estis preskaŭ nekonata, nun la movado vigliĝas dank' al la fervoraj gesamideanoj prof. T. Kovačs, s-ino Mandich, s-o J. Sikič. La laste nomita malfermis novan kurson kun 30 ĝelernantoj. En maljo fondiĝis loka grupo (Esperantista grupo Fiume).

En Gävle (Svedujo)

la estraro de lernejoj decidis enkonduki Esperanton en la teknikajn vesperajn lernejojn. Kiel gvidanton la estraro elektis kaston s-on Helsing. S-o Axel A. Helm en Hästveda komencis Esp. kurson en la studrondo de J. O. G. T.

Leterkesto de ET.

V. T. en Budapeŝt. — Via abono nun daŭras ĝis 157. T. T. en Pleven. — Sendite mono ne sufiĉas. Anonco kostas 18 levon (ne 10!). Post ricevo de plua 8 ni represos vian anoncon.

Amikoj en Astrahan. — Vi ŝajne havas superfluan de papermono, ĉar vi tiel ofte sendas al ni ĉiusepacajn rublojn. Iam ni povis uzi ilin, ĉar pro intereso amikoj aĉetis la kuriozaĵojn. Sed nun la afero aliĝis. En Germanujo ni havas mem sufiĉe da senvalora papermono. Do se vi volas mendi gazeton aŭ anoncon, uzu nian abonon en Moskvo, al kiu vi povas pagi per via mono.

Ni povas liveri

el malnovaj numeroj nur:
1 (sp.), 9, 24, 25, 26, 27, 28, 31, 32, 36, 37, 38, 43, 45, 46, 47, 48, 49, 51, 52, 53, 54, por kiuj ni devas kalkuli ĝis 3 novaj numeroj, 55—86, 89—108.

Ni deziras ricevi

n-ojn 73, 82, 85, 87, 88, 89, 90, por kiuj ni liveras aŭ enskribas en abonkonton ĝis 4 novaj numeroj, se ili ankoraŭ estas puraj kaj vendeblaj.

Oni postulu! Oni sendu!

Adm. de ET.

Gazetaro.

Ytads-Bladet Aurora, 28. okt., pri Internacia Labora Oficejo laŭ „Esp. Triumfonta“.

Twentsch Dagblad Tubantia, Enschede, 25. okt., kun favora recenzo pri „Esp. Triumfonta“.

Stamboul, 18. okt., sciligas, ke oni preparas Esp. instruadon ĉe la universitato de Stamboul.

Giornale di Udine, 28. okt., pri Esp. kaj Ligo de Nacioj.

Bratislavská Pošta, n-oj 8-9, kun Esp. angulo.

Krakonoŝ, Jičín, ari. pri „Esp. kaj kuracistoj“.

Jutarnji List, Zagreb, 30. okt., pri „Esp. kaj muziko“, 27. okt., pri „Esp. ĉe Ligo de Nacioj“.

Le petit Marseillais, Marseille, 18. okt., pri Esp. en Avignon.

La France du Nord, Boulogne-s-Mer, 18. okt., kun bona artikolo de s-o F. de Menil.

L'Emancipation, Saint Denis, 14. okt., pri Esp. kaj Ligo de Nacioj, 21. okt., pri Esp. kaj la proletariato.

L'Indépendant de la Charente inférieure, Saintes, 18. okt., pri Esp. kaj Ligo de Nacioj.

L'Ere Nouvelle, Paris, 4. 11., pri Esp. kaj Intern. Labora Oficejo.

Le Ralliement, Bruxelles, 1. okt., kun longaj artikoloj pri Esperanto.

Hamburger Echo, sept., pri „Mondlingvo kaj Mondproletariato“.

Leipziger Tageblatt und Handelszeitung, 18. okt., pri la mondlingva movado.

La Itala Esp. Fed. dissendis al ĉiuj siaj Delegitoj resumajn raportojn pri la diskuto kaj decido de L. d. N. pri Esp. Represis ĝin multenombraj naciaj gazetoj en Ancona, Firenze, Venezia, Trieste, Aleksandrio Egipta ktp. La Raporto plena kun aliaj protokoloj estos baldaŭ publikigata en itala traduko de Libroficejo de F. E. I.

Diversaĵoj.

Oleo el tabako.

El la studoj, faritaj en la Centra Agrikultura Esplora Instituto en Sofia (Bulgario) pri la eco de l' tabaksemo, estas videble, ke tiu ĉi enhavas 28—30% da oleo. La oleo estas flavŝajna kaj tiel bongusta kiel tiu de l' papava semo. Unu matura tabakbukedo donas ĉirkaŭ 10 gr. da semo, kaj en dekaro estas semataj minimume 10000 tabakradikoj, sekve el unu dekaro da tabako oni rikoltos ĉirkaŭ 100 kg. da semo. Se el tiu semo oni eliros nur 15 kg. da oleo, aldonante ankaŭ la furagrestojn ricevotan, tio donos al la produktanto profiton da 1500 bulg. levoj je dekaro. La kolektado de la semo okazas tre facile, t. e. preskaŭ senpene oni povas ricevi el tiu kulturo ankoraŭ unu signifan profiton.

En Bulgario post la milito estas semataj ĉiujare pli ol 350000 dekaroj per tabako. Se oni kolektos la semon de la tuta tabako, oni ricevos 35000000 kg. da semo, el kiuj oni produktos 5250000 kg. da oleo kaj ĉirkaŭ 24000000 kg. da furagrestoj. Tiuj ĉi produktoj laŭ la nunaj bazarprezoj donas sumon de 175000000 bulg. levoj, kiu ne estas malatentinda, tiom pli, ĉar ĝi venas preskaŭ donace al la tabakkulturistoj.

Por vidigi kiamaniere oni akiras la oleon kaj ĝiajn ecojn al la loĝantaro, la Instituto faris kelkajn demonstraciojn kun granda sukceso.

Komunikis: Jv. Krestanoff,
(Dresden A 16.)

La plej varma temperaturo sur la terglobo.

Sur la tero plej alta temperaturo regas en la silenta malaltaĵo en Kalfornio, nomata „Valo de l' morto“. Tiu loko, longa 20 kilometrojn, havas dumtage plej varman temperaturon de 160° Fahrenheit (71° Celsius), kaj eĉ dum noktomezo la termometro montras 120° Fahrenheit (preskaŭ 49° Celsius). La tero varmiĝas sub la influo de la suno ĝis tiu grado, ke levante ŝtonon de la tero, oni brulvundigas siajn fingrojn. Tiu regiono produktas plej multe da borakso en la tuta mondo. Ĝis antaŭ nelonge oni transportis tiun valoran salon per ŝarĝaj aŭtomobiloj al la fervoja stacio malproksima ĉ. 300 kilometrojn. La produkton kaj transporton de borakso malhelpas grandegaj malfacilaĵoj, kaŭzitaĵo precipe per la varmeĝo. Oni trovis mortintajn veturigistojn tenantajn ankoraŭ la botelon kun la akvo en la manoj. La akvo alveturigata tien en grandaj ujoj ekbalas pro la varmeĝo. Amerikal ingeneroj kreis preskaŭ miraklon, ligante per fervoja linio tiun valon de morto kaj infero kun la cetera mondo. Oni konstruis tutan vicon de viaduktoj. Per la fervojo oni grave faciligis la produktadon de borakso, kiu nun atingas 3 milionojn da tunoj ĉiujare.

La virinkomercio kaj la reguligo de elmigrado. — La estonta Internacia Labora Konferenco kaj suprenomita demando.

Dame*) Rachel Crowley, Sekretario de la Konsilia Komitato de la Ligo de Nacioj pri la komercio je virinoj kaj infanoj, estas invitita ĉeesti la kunsidojn de la estonta Internacia Labora Konferenco, kiam oni traktas elmigradajn demandojn. Tiu ĉi invito rezultas el deziro esprimita en la lasta kunsido de la Konsilia Komitato okazinta en Genève je la komenco de Julio.

La Internacia Labora Konferenco, kiu estas la kvara kunvenanta laŭ la Packontrakto, malfermiĝos en Genève la 18. oktobron. Ĝin ĉeestos delegitoj reprezentantaj registarojn, mastrojn kaj laboristojn en ĉiuj partoj de la mondo. Unu el la temoj en la tagordo estas proponita internacia konsento pri regula kaj uniforma kolektado de ciferoj rilate al elmigrado en la celo de taŭga studado de la mona situacio en tiu ĉi afero kaj ĝusta komparado de la pozicio en ĉiuj ŝtato.

La procedo de la Internacia Labora Konferenco, traktante la demandojn proponitajn al ĝi, estas nomi malgrandan komisionon el siaj membroj por studadi la temon detale kaj laŭ ĉiuj vidpunktoj, kun helpo de spertuloj el ĉiuj landoj. Tiu ĉi komisiono prezentas raporton enhavantan siajn rekomendojn, kiujn oni poste diskutas en plena kunsido de la Konferenco.

Sekve la Internacia Labora Oficejo ankaŭ proponis, ke oni petu Dame Rachel Crowley paroli antaŭ la komisiono nomita por ekzameni la demandon pri elmigradaj ciferoj, por ke la delegitoj posedu informon kiel eble plej kompletan laŭ ĉiuj vidpunktoj pri la temo proponita al ili.

„Publikigitaj statistikoj ne ĉiam distingas elmigrantojn eĉ laŭ sekso“, diras libreto ĵus disdonita de la Internacia Labora Oficejo resumante la nunan situacion. La neceseco de uniforma informo pri ĉi tiu sola punkto estas klara, ĉar „tiu ĉi faktoro tre influas sur la naturo de la elmigrado kaj sur la kondiĉoj, en kiuj asimiliĝo

*) „Dame“ estas honora titolo donita al virino akceptita en la Ordeno de la Brita Imperio kvazaŭ kiel kavaliro.

okazas. Montrado de sekso estas speciale utila al la Internacia Labora Oficejo por la eventuala aplikado de protekta rimedo favore al elmigrantoj. Sekve estas proponite, ke ĉiuj ŝtatoj redaktu sian informon laŭ uniforma sistemo rilate al sekso, aĝo, familia stato kaj profesio.

Internacia Labora Oficejo.

Rimarkinda Konsultlibro. — Tutmonda Labora Adresaro.

Ĉiuj personoj interesigantaj iamaniere pri demandoj rilate al industrio kaj laboro trovas, ke unu el la plej altvaloraj konsultlibroj por ili estas la dua ĉiujara eldono de la Internacia Labora Adresaro ĵus publikigita de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj. Tiu ĉi volumo estas presita en angla, franca kaj germana lingvoj, kaj enhavas sciigojn pri registaraj departementoj kaj privataj organizaĵoj sin okupantaj pri laboro kaj industrio en 72 landoj, sciigojn ne haveblajn aliloke.

La personaro de la Internacia Labora Oficejo penis krom eble plibonigi kaj plivastigi la unuan eldonon publikigitan lastan jaron, kaj la nuna eldono enhavas informojn pri pli ol 1800 mastraj asocioj, 2300 laboristaj organizaĵoj, 600 intelekt-laboristaj asocioj, 43 eksbatalantaj grupoj, 450 kooperaj societoj kaj ĉirkaŭ 40 diversspecaj internaciaj institucioj. La nombro de paĝoj estas plimultigita de 600 al 1000.

Unu sekcio donas mallongan rakonton pri la fondo de la Internacia Labora Organizaĵo kaj de la Ligo de Nacioj kune kun sciiganta historio de la laborado de la diversaj fakoj de la Oficejo apartenantaj al tiuj institucioj. Dua sekcio donas liston de la registaraj departementoj en la tuta mondo, kiuj sin okupas pri laboro kaj industrio, kune kun skizo de la organizo kaj funkcioj de tiuj ĉi departementoj, nomoj de respondecaj oficistoj, kaj informoj pri oficialaj eldonaĵoj.

Oni treze zorgis fari kiel eble plej kompletaj la sekciojn enhavantajn tabelformajn listojn de la plej gravaj mastraj kaj laboristaj organizaĵoj en la diversaj landoj. Tiuj ĉi listoj donas ne sole la nomojn kaj adresojn de tiuj ĉi organizaĵoj kaj la nomojn de iliaj ĉefaj oficistoj, sed ankaŭ la titolojn de iuj gazetoj eldonataj de ili, la lastajn disponeblajn ciferojn pri membraro, aŭ la nombro de firmaj aliĝintaj al mastra organizaĵo, kaj la naciaj kaj internaciaj aliĝoj de ĉiu organizaĵo.

Aliaj sekcioj aperantaj la unuan fojon en la nova eldono enhavas similajn listojn de naciaj kaj internaciaj organizaĵoj sin okupantaj pri intelektaj laboristoj kaj eksbatalantoj kaj la sekcio

pri kooperaj organizaĵoj estas treege pligrandigita. En la ĉiasta sekcio la dato de fondo kaj la cifero de la spezo estas donitaj kiam ajn ili estas disponeblaj.

Internacia Labora Oficejo.

Parolejo.

134. Pri „Monumento Zamenhofa“.

En la artikolo „Monumento Zamenhofa“ (ET 106) plendas s-o Kilian prave, ke ekzistas nur malmultaj aĉetebaj verkoj de Zamenhof kaj aliaj bonstilaj verkoj. Tamen ni havas, ĝis kiam la Esperantistaro mem povos eldoni tiujn verkojn, tre bonan anstataŭantan verkon, facile aĉeteban, nome: „Dokumentoj de Esperanto“, kunmetitaj de D-ro A. Möbusz, Lübeck. Ĉiu Esperantisto, kiu volas informi sin pri la historio kaj scienca bazo de la Lingvo Internacia, pri la Esperanto-movado kaj pri la organizo de la Esperantistaro, nepre devas posedi ĉi tiun fundamentan verkon. La libro enhavas l. a. ĉiujn kongresparoladojn de D-ro Zamenhof kaj multajn aliajn gravajn dokumentojn. Ĉu ne preskaŭ ĉiu Esperantisto povas aĉeti ĝin? Kiu tiun verkon ofte legas, lernas Esperanton efektive tre bone!

Rudolf Michael Frey,
Wien.

135. Kontraŭ la nacia Esp. gazetaro.

En ET n-o 95 mi legis la artikolon de s-o Józef Litauer, sub la supre nomita titolo, kaj mi konsentas kun lia opinio.

Certe estas nenecesa la eldono de naciaj gazetoj, ĉar tio estas disigi la tortojn, malbonuzi la tempon kaj forfuŝi la monon.

Ni havas „Esperanto“ kiel oficialan gazeton, „Esp. Triumfonta“ kiel specialan gazeton por diversaj informoj, kiuj estas gravaj por Esperantistoj. Por kio ni havas naciajn gazetojn? Ni Esperantistoj ne povas legi diversajn naciajn gazetojn. Tio estus tro multekosta, kaj ni ne havas tempon por tio.

Ĉiu Esperantisto devas eblon tiujn du gazetojn, tio estas laŭ mia opinio necesa kaj deviga, kiam ni volas subteni la propagandon de nia mondhelpingvo.

Kion ni bezonas, estas fakaj gazetoj, nome por ĉiu fako unu, kaj la titoloj devas esti publikigitaj en la du suprenomita gazetoj, por ke ĉiu Esperantisto sciu la ekziston de ili. Tiel ankaŭ ni bezonas fakan vortaron por ĉiu fako.

Por nacia propagando sufiĉas nacia Esp. folieto por informi la publikon pri la Esp. movado; ĝia disvastigo, la utilo de la lingvo ktp.

En Java ni nun eldonas tiun folieton, kaj la kosto estas modera. En tiuj naciaj gazetoj devas esti menciataj la supre nomitaj gazetoj precipe por la sciigo de novaj Esperantistoj. Tio estas mia opinio la vera propagando, sen multe da elspezoj.

P. W. Van den Brock,
Java.

Recenzejo.

LIBROJ.

STRANGA HEREDAĴO. Romano originale verkita de H. A. Luyken. 320 pĝ. broŝur. Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig.

Kiel romano, originale verkita en Esperanto, tiu ĉi libro meritas nian specialan intereson kaj pli detalan recenzon ol kutime.

La enhavo estas sufiĉe romaneca. Mortanta s-o Marston postlasis al sia filo Leonardo strangan heredon: la prizorgadon de bela kaj puranima knabino Lorna Prior, filino de iama ematino de s-o Marston kaj duonfilino de kunfrmano de Leonardo, s-o Hugo Vincent. (Alia stranga heredaĵo de la sama mortanto, riĉaĵoj nehoneste akiritaj kaj uzataj por bonfaraj celoj, ŝajne ne difinis la tiulon de la libro.) Duonoklino de Lorna, f-ino Delfino Haverford, fratino kaj ankaŭ kunfrmanino de s-o Vincent, suspektas sian fraton pereiginto de sia amfeliĉo, ĉar li kalumniis ŝin ĉe ŝia fianĉo Roberto Travers, tiel ke Roberto forlasis ŝin kaj laŭfame mortis en Afriko en batalo kun berberoj. Konfuzite per okupado kun spiritismo, ŝi intencas venĝi sin, unue malsanigante la filon de sia frato, Malkomon Vincent, poste kondukante sian duonnevino Lorna Prior en moralan danĝeron kaj fine bruligante la fabrikojn de la firma, antaŭe elpreninte el la firma sian parton de la akcioj. Leonardo Marston, cetere fervora Esperantisto kaj viro de eksterordinara, preskaŭ sanktula karaktero, sukcesas savi Malkomon; sed, devigite restadi kelkajn monatojn en Ameriko, li ne povas malhelpi, ke Lorna kaptiĝas en la reto de religia sektestro, homo kun alta intelekto sed malvirtaj moralaj kvalitoj. En Ameriko Leonardo Marston hazarde renkontas sinjoron, kies voĉo memorigas al li la laŭfame jam delonge mortintan fianĉon de f-ino Haverford. Li sekvas lin al Meksiklando, kie li — sub tre aventuraj cirkonstancoj — certigas, ke la sekvito efektive estas la laŭfame mortinta Roberto Travers, kiu intertempe alprenis la nomon de sia kamarado fakte mortinta en la citita batalo. Laŭ peto de Leonardo la retrovito donas al li rekonigilon por sia iama fianĉino, por ke ŝi resaniĝu de sia imago, ke la spirito de la mortinta fianĉo ordonas al ŝi peregi en la kaŭzinton de ŝia malfeliĉo. Fine reveninte hejmen, Leonardo sukcesas konvinki f-inon Haverford, ke ŝia fianĉo ne mortis kaj ke ŝia imago estas kaŭzita de malbonaj spiritoj. Sed jam tro malfrue. Li povas ankoraŭ savi Lornan, kiun li mem kore amas, el la manoj de la religia sektestro, sed ŝi malsaniĝas kaj mortas. — Okaze de Esp. postkongresa restado en Svislando, Leonardo Marston konatiĝis kun gesamideanoj Harding bonaj sed laŭ karaktero tre malsamaj geedzoj. Leonardo kaj s-ino Harding tuj eksentis koran simpation unu por la alia. Post la iom subita morto de s-o Harding (la leganto havas la senton, ke la morto de s-o H. devas okazi nur por ebligi al lia edzino edziĝon kun viro pli konvena por ŝi) kaj post la morto de Lorna, la romano harmonie finiĝas per edziĝo de la senkompara Leonardo kun la bela kaj alklara vidvino.

Jen mallonga ekstrakto el la agado de l' romano. La komencaj ĉapitroj estas iom tedaj kaj frazemaj, sed iom post iom la leganto varmigiĝas kaj konsentas kun la agantaj personoj de la romano, precipe kun Leonardo Marston kaj Lorna Prior, kaj ĉe la priskribo de la aventuraj epizodoj en Meksiklando, kie ankaŭ la lingvaĵo fariĝas pli natura kaj pli viva, la intereso atingas sian plej altan gradon. La fino estas kontentiga, kva kam oni atendas ankoraŭ iom aŭdi pri la „stranga heredaĵo“ koncerne la post-lasitajn riĉaĵojn de la maljuna s-o Marston kaj pri la sorto de kelkaj personoj kunagintaj en la romano.

La stilo estas bona kaj flua, sed la lingvaĵo estas tre „mola“, dolĉa, kvazaŭ ĝin verkis „mezaĝa“ fraŭlo.

Cetere, la ofta citado de Esperanto kaj Esperantismo tedas; mi havas la senton, kvazaŭ la verkinto voĉis skribi propagandan traktaton por „nia kara lingvo“ kaj la „interna ideo“. Mi preferas pli fortan lingvaĵon kaj pli naturan priskribon de homaj agoj kaj sortoj. Tamen mi supozas, ke la plimulto de la Esperantistoj ŝatas la lingvaĵon de la verkinto.

Pri kristanismo, spiritismo, Esperantismo ktp. la verkinto eldiras kelkfoje tute trafaĵn, sed parte tre strangajn sentencojn. Sed tio estas lia afero, kaj la leganto havas plenan liberecon konsenti je li aŭ ne.

Gramatikajn erarojn aŭ nekorektaĵojn mi trovis nur malmulton. Kelkfoje la verkinto intermiksas la pronomojn, ekz. ili anstataŭ si (pĝ. 41), liaj anst. ŝiaj (pĝ. 130), lia anst. sia (pĝ. 221); kelkfoje mi trovis si anst. ŝi, sed tio ŝajnas esti preseraroj. Unufoje mi trovis akuzativon anst. nominativon (p. 71: alprenu de helpingvo kiel internacian komunikilon). Trifoje la verkinto uzis akuzativon post „tra“, kio estas nebezona (p. 9: tra la parkon, p. 97: tra la florgardenon, p. 173: tra la stacidomon). Aliaj riproĉindaĵoj: la virino rigardigis (anst. rigardis) la konvorton; la maljunulo ne lasis sin ĝenigi (anst. ĝeni); virinon sidantan, muelante (anst. muelantan).

Anstataŭ „leni sekreto“ mi preferus „gardi s.“, „anst. flanko de flanko“ mi dirus „flanko de flanko“, „anst. „efikas sur mi“ „efikas sur min“, ktp.

La nemultaj preseraroj konsistas plejparte el intermikso de kun- kaj sensupersignaj literoj, ekz. ĵus anst. ĵus, felicego anst. felicego, k. a. Unufoje vorto staras en malgusta linio, aliffoje mankas vorteto, dufoje mi trovis s. anst. z: precisiĝo, rezultato.

Kion signifas „Tangero“? Eble la urbon Tanger en Maroklando?

Klaŭro de la libro estas tre moderna, la preso bona kaj klara.

Mi supozas, ke neniu Esperantisto volas malhavi tiun belan volumon en sia biblioteko, precipe ĉar ĝi estas originala Esperanta romano.

(Teo Jung)

HERMANO KAJ DOROTEO. De Goethe. Tradukis Benno Küster. 77 pĝ. Eldonejo Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig. Aktualan prezon sciigos la eldonoj laŭ deziro. Mi ankoraŭ ne havis la tempon tralegi tute tiun verkon, kiu aperas jam en 2-a, korekita eldono, kun antaŭparolo de D-ro Dietler. Sed la kelkaj partoj, kiujn mi sukcesis tralegi, sugestas al mi la ĵugon, ke la traduko de la fama eposo de l' plej glora germana poeto estas bone presita kaj plaĉe aranĝita, el la tutmonda samideanaro.

(T. J.)

GAZETOJ.

Belga Esperantisto, aŭg.-sept.
La Progreso, okt.
Verda Utopio, jul.-sept.
Esperanto-Praktiko, okt.
L'Esperanto, okt.
Hungara Esperantisto, okt.
Kristena Espero, jul.-aŭg.
La Nova Epoko, okt.
Esperantista Junularo, aŭg.-sept.
Svenska Arbetar-Esperantisten, n-o 3.
La Interligilo de l' P. T., organo de la Unueca Poŝta Federacio de l' Francio, okt.
Vegetarano, okt.
Hoŭanda Esperantisto, 26. okt.

BALDAŬ APEROS:
„PRETER LA VIVO“
POEMARO DE
JULIO BAHY.
SUR BONA PAPERŬ, EN LUKSA VESTO, APEROS 80 ORIG. POEMOJ DE LA POETO KUN LIA PORTRETO KAJ ANTAUPAROLO DE K. DE KALOCSAY. (100-120 PAĜOJ) LA EKZEMPLEROJ ESTOS NUMERITAJ KAJ HAVOS PROPARANAN SUBSKRIBON DE LA AŬTORO.
*
ABONPREZOJ:
POR ORDINAŬA ELDONO 1 SV. FK.
POR LUKSA ELDONO KUN PORTRETO . . . 2 SV. FK.
MENDU ANTAŬ APERO, ĈAR POST APERO LA PREZO PLIALTIĜOS! SENDU LA MONON EN NACIAJ BANKBILETOJ AL ADRESO: „LITERATURA MONDO“, BUDAPEST VI, ANDRASSY UTCA 81. II. ISZ.

La
Steloj
anoncas vian sorton!

Mi sciigas al vi vian horoskopon bazantan sur nepre scienca bazo. Ĝi estas al vi en ĉiuj animaj kaj materiaj vivdemandoj certa konsilanto kaj helpanto. Preciza matematika kompilo, detala kaj individua aŭguro, aplikoj de plej novaj psikologiaj helpiloj. — Oni sciigu al mi la lokon, jaron tagon kaj horon de naskiĝo; skribspecimeno (eventuale bildo) dezirata. — Horoskopo gmk. 1500.—

Freifrau Irene v. Veldegg, Niederössnitz (bei Dresden), Lindenastrasse 9, Germanujo.

Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinekvaj enprezoj) kotas po du enprezoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.40 jeno, 0.50 ĥil., 1 nord. kr., 1 din., 1 sviz. fr., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 2 esk., 3 ĥil., 6 ĥil., 7 fmk., 10 din., 18 lei, 18 lev., 250 gmk., 200 ĥung. kr., 1000 pmk., 5000 aŭstr. kr. Ĉiu povas pagi per la aĉetita nomita valuto, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 stamp. resp.-kup. Anoncetoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fr. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdeziro de la abonanto, de aliaj ni enprezas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo. — Abstrajn monbiletojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli. — En specialaj aŭ eksterordaj numeroj specialaj prezoj.

NASKIĜO. Al gesinjoroj Leutenanto Maurice Van Wanssele-Barbaix (Düsseldorf) naskiĝis dua filineto Denise.

GESINJOROJ D. E. Parrish informas pri sia nova adreso: 1011 Elmwood Ave., Buffalo, N. Y., Usono.

EKKRIO. Juna 22-jara ŝtulo, akademia skulptur-kaj pentristo petas usonan samideanon p-untonon kiel pruntaĵon aŭ hipotekon 20 dol. (ĉ. 100 000 gmk.) por ebligi 6-monatan restadon en renejo. Mi inklinas al ĉia ekvalento; okaze de plura proponoj mi sciigos.

Ofertojn sub „Ekkrio“ bonvolu direkti al la redakcio de „Esp. Triumf.“ en Horrem-Köln.

HOLLANDAJ Esperantistoj

Lernolibroj,
Vortaroj,
Legolibroj,
Literaturo,
Krestomatiloj,
Poemaroj,
Muzikaj kaj
Propagandiloj

estas haveblaj en la

Centra Esperanto Librejo
Bankastraat 2a, 's Gravenhage.
Tel.: H. 6703. Poŝtkonto: H. 19480.

Nederlanda Anonima Societo
Luksa-pano Fabrikoj
antaŭe Henri J. Carels.
50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.
Luntejo Carels
(telo: H.A. Scharwächter)
63 Weimarstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

AL MIAJ KLIENTOJ! Mi ricevis multajn konfesleterojn, sed, ŝparante elspezojn kaj tempon, mi estas devigata, danki ĉiamaniere. Grafologo Hans Chlubna, Wien V., Storkgasse 12, Aŭstrio.

„ESPERANTO“. Kiu abonanto ne konservanta daŭre la gazeton povus sendi la 3. (martan) numeron 1921 al f-ino B. Veselá, del. de UEA en Josefov 21., Ĉeĥoslovakio? Iu ajn kompenson.

LUZICAJ SERBOJ estas petataj korespondadi kun Svetislav Petroviĉ, instruisto en Ohrid, Serbio (Jugoslavio). La nomito deziras aĉeti la libron „Kraljeviĉ Marko“ de M. Abesgova. La havanto bonvolu ĝin sendi kaj postuli rekomponcon.

KONTRAŬ 10 DOLAROJ aŭ 10 svizaj frankoj mi sendas kompletan serion da rumana kronada poŝtmarko, eldonita kun kronado de rumana reĝo. Adalbert Toader, Teiuŝ-gara, Rumano.

GRAVA INFORMILO por ĉiu korespondanto kaj kolektanto! BES-a Adresaro. Nova, kvara eldono. Prezo 1.50 sviz. fr. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 180 mk. frankite. Tuja sendado post pago. Havebla ĉe Esp. Eldonejo Batin & Jung, Godesberg (Germ.).

LA TRIUMFO DE ESPERANTO

Gramatika Praktiko
Flandra kaj franca, de L. Varendonck

Prezo: 3 15 fk. enlande
5 50 fk. eksterlande
Rabato ĉe granda mendo.

Eldonita:
„La Tagiĝo“, Posthornstr. 14, Ledeburg (Belg.)

Interesajn artikolojn
bonajn, ne tro longajn, kiuj
koncernas nian movadon kaj
aferojn de ĝenerala intereso

ni nun bezonas por ET!

Abonejoj de ET en la landoj

Aŭstria: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Ten 111, Postamt 34.
Belga: Frans Schoofs, 48, Kl. Beernaert, Antwerpen. Poŝtka konto n-o 29490.
Brazilia: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Ofito Lumpe, Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkonto 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Francisa: Esp. Centra Librejo, 81 rue de Cligny, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalán.
Hungara: Páulö Balkányi, Halos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.
Latvia: Talvaldo Indra, Riga, Pasta kaste 47b.
Litova: Páulö v. Medem, Smelū g-ve 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlanda: J. Ravestein jr., v. Aerensensiraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝtkonto: H. 19480.)
Pola: Adolfo Oberholman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3128).
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Ĉiuj.
Rusa: Mikaelo Valentinov, sekretario de Centra Komitato de S. E. U., Moskvo, poŝtkonto n-o 630.
Sveda: Förlagsförlagen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Korespondado kaj Interŝanĝo.

Peter Thomaser, Villach, Völkendorferstrasse 41., Aŭstrio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ mankolistoj aŭ nombro kontraŭ nombro, kaj poŝtkartojn ilustr. kun samideanoj el ĉiuj landoj.

Kiu sendos al mi 50—100 bonajn poŝtmarkojn sialandajn, ricevos samkvanton de Germanio. Ankaŭ donas librojn. Nedemandinte sendu por ŝparo. Validas ĉiam. Hermann Remers, Düsseldorf, Luisenstr. 97, Germanio.

S-o Bazilo Averin, 6 uĉ. 3 Bakaldá, N-o 30, Astranan (Rusujo), deziras korespondi.

Konstanty Chmielewski, bibliotisto, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1a. volas interŝanĝi polajn poŝtmarkojn pogrande (de 200 ĝis 1000 aŭ pli) laŭ katalogo. Sendu nur nedifektajn.

S-oj Georges Foucher, 39 Bis., Rue Danton, René Steven, 11 Rue Carnot, Armand Hellouin, 106 Rue Gravel, Edmond Mille, 124 Rue Chevallier, ĉiuj en Levallois Perret (Seine), Francujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. (bŝ).

S-o R. Horaitik, Kumzak 148, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Tre serioza interŝanĝo.

En Preparo:
D-ro Edmond Privat:
Vivo de Zamenhof
(Speciala eldono por mez-k. malbonvalutaj landoj)
Historio de la lingvo Esperanto
Salom-Aleĥem. Percé:
Hebreaj rakontoj
El la hebrea originalo trad. Is. Muĉnik
(Internacia mondliteraturo vol. 9)
Eugen Wüster:
Teknika vortaro
Esperanta-Germana, Germana-Esperanta
Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Leipzig.

Ni atentigas la legataron, ke
LA SENLINGVULO
estas
elĉerpita
Pri novaj, baldau alirontaj verkoj informos niaj anoncoj.
Budin & Jung, Godesberg, Germanl.
Poŝtka konto Köln 92036.

Eau de Cologne,
★ Parfumoj, Tualetoj ktp. ★
Aug. Junker, Köln a. Rh., Hohestrasse 26, Germ.

Josef Buka, Nymburk, Smetanova 719, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj literojn pri ĉiuj demandoj.

S-o Marcel Wottier, Haringrodestraat 54, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (bŝ).

Fraŭlo Maksimilian Trenner, teknikisto, Wien II/1., Zirkugasse 27/3, deziras korespondi pri radio-telegrafa, telefona kaj similiaj temoj. Li estas tre okupita kaj petas siajn korespondantojn skribi al li denove.

S-o Alfonso Cappellini, Via S. Lucia 6 (quartieri 4), Firenze (Italio), deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn (bŝ), poŝtmarkojn kaj paperonon.

S-o Richard Köhn, Stendal (prov. Sachsen), Grabenstr. 14 II, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj literoj kun ĉiuj landoj.

S-o Walter Gricthe, Magdeburg, Kurze Strasse 1, Germ., deziras korespondi kun naturamikej el ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Gustav Exner, Magdeburg, Wasserkunstr. 30, Germ., deziras korespondi kun idealaj samideanoj el ĉiuj landoj per literoj kaj ilustr. poŝtkartoj. Interŝanĝas ankaŭ Esp. gazetojn.

S-o Garello Ello, Tlezza Carignano 14-5, Genova (Italio), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.